

Heinrich Heine,  
Kie, laca vagabondo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Kie, laca vagabondo,  
trafos mi al lasta hejm' ?  
Ĉu sub suda palmofrondo?  
Sub tilio apud Rejn' ?

Ĉu min en dezert' enfosos  
haste ies fremda man',  
aŭ en sablo mi ripozos  
borde de la ocean' ?

Kie ajn! Min la ĉieloj  
brakos, kiel tie ĉi,  
kaj funebro-lampe steloj  
ŝvebos nokte super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976).*

*Arg-63-1083 (2010-05-26 19:45:24)*

Heinrich Heine,  
Grabspruch

Wo wird einst des Wandermüden  
letzte Ruhestätte sein?  
Unter Palmen in dem Süden?  
Unter Linden an dem Rhein?

Werd' ich wo in einer Wüste  
ingescharrt von fremder Hand?  
Oder ruh' ich an der Küste  
eines Meeres in dem Sand?

Immerhin! Mich wird umgeben  
Gottes Himmel, dort wie hier,  
Und als Totenlampe schweben  
nachts die Sterne über mir.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17).*

*MR-261-1c / Arg-63-122 (2003-10-26 01:05:12)*

Heinrich Heine,  
Tombosentenco

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kie estos ripozejo  
lasta de migranto mi?  
Ĉu sub palmoj en forejo?  
Aŭ ĉe l' Rejno sub tili' ?

Ĉu enfosos min malpie  
iu en dezerta land' ?  
Aŭ ĉu mi ripozos ie  
en la sablo de marstrand' ?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie  
la ĉiel' de l' granda Di',  
steloj tie ĉi kaj tie  
lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1993.*

*MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)*